**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 1

**Ekzerco 1.** Enskribu ĝuste en la vortspacon.

**1.** Ne juĝu pri ␣ **f** ␣ **r** ␣ laŭ ĝia ekstero.

**2.** En la ␣ ␣ **g** ␣ de la Sankta Neniamo.

**3.** Tute ␣ ␣ **b** ␣ **r** ␣, kiel birdo aera.

**4.** Vort' en ĝusta momento ␣ ␣ **r** ␣ ␣ pli ol arĝento.

**5.** Plej ␣ **r** ␣ ␣ **d** ␣ potenco kuŝas en la komenco.

**6.** Diru al mi vian ␣ ␣ **m** ␣ ␣.

**7.** En la lingvo "Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta ␣ ␣ ␣ **d** ␣.

**8.** Al tio ĉi, lia laborado estus pli pura, pli ␣ ␣ **c** ␣ **l** ␣ kaj pli interesa.

**9.** Ŝi prenis la plej ␣ ␣ **l** ␣ ␣ arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo.

**10.** La patro donacis al mi libron kaj de la frato mi ␣ ␣ **c** ␣**v**␣ ␣ plumon.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝuste en la vorton.

**1.** Ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis **v**␣ **v** ␣ kun ili.

**2.** Jim estas bonega knabo, sed tre ema **k** ␣ ␣ **d** ␣ spiritojn, sonĝojn kaj antaŭsignojn.

**3.** Li paliĝis de timo kaj poste li **r** ␣ **ĝ** ␣ ␣ ␣ ␣ de honto.

**4.** Post kelkaj tagoj estis la **l** ␣ **s** ␣ ␣ semajno de la monato Majo.

**5.** Jam estas **t** ␣ **m** ␣ ␣ iri domen.

**6.** Rekta **v**␣ **j** ␣ estas pli mallonga, ol kurba.

**7.** Sinjoro leŭtenanto! Ekkriis Stella vive kaj **l** ␣ **v** ␣ ␣ sin de sia seĝo.

**8.** Ni **v**␣ ␣ ␣ ␣ per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj.

**9.** La **j** ␣ ␣ ␣ vidvino fariĝis denove fianĉino.

**10.** La dudeka tago de Februaro estas la kvindek-unua tago de la **j** ␣ ␣ ␣.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| kap', amik', parol', ĝoj', nov', kred', tut', sam', patr', infan'. |
|---|

**1.** Malsame ol en pli varmaj kaj ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **m** ␣ ␣ landoj silento ne estas konsiderata kiel minaco aŭ embarasiĝo: finnoj povas ĝoje kaj kune silenti.

**2.** Elhaida Dani ␣ ␣ **j** ␣ **g** ␣ ␣ siajn samlandanojn, kiam ŝi venkis en la ĉi-jara talento-konkurso "La Voĉo de Italio".

**3.** Julia finis elementan kurson antaŭ du jaroj, sed ne havis eblon perfektiĝi kaj ŝi ne estas rimarkinde pli sperta lingve ol la ␣ ␣**v**␣ **l** ␣ ␣.

**4.** Rakontu al mia juna amiko tiun **n** ␣ ␣ ␣ ␣ **d** ␣ ␣ **l** ␣ ␣ historion.

**5.** Granda parto de la literaturo, kiun nuntempaj universitataj studentoj pri ekonomiko devas ␣ **n** ␣ ␣ **p** ␣ **g** ␣, baziĝas sur la marĝenismaj principoj.

**6.** La furora ĉeesto de nia lingvo en Duolingo kaj ␣ ␣ ␣ **k** ␣ **m** ␣ estas lastatempaj fenomenoj en instruado de Esperanto.

**7.** La malgranda Nikoĉjo, promenante kun sia ␣ ␣ ␣ **r** ␣ **n** ␣ sur la bordo de rivero, per nesingardo tien enfalis.

**8.** Tie ĉi sin trovas rostaĵo, kukaĵo, kelkaj boteletoj da biero kaj kelkaj funtoj da bombonoj por miaj ␣ ␣ **f** ␣ ␣ ␣ **t** ␣ ␣.

**9.** Pliiĝo de pakumo efektive kaŭzas prezleviĝon de la vara ␣ ␣ **t** ␣ **ĵ** ␣.

**10.** Aleĉjo rememorigadis al Marinjo la infanajn jarojn, pasigitajn kune kun li, kaj la ␣ ␣ **m** ␣ **c** ␣ ␣ de la sango, kiu fluis en la vejnoj de ili ambaŭ.

**Ekzerco 4.** Marku vorton korespondan plej ĝuste:

**1.** Al sin aeren ĵetinta muso, kobro neniam ebligas, ke tiu falu surteren. Ĝi kaptas ĝin ankoraŭ dum la ___.

**a.** demando **b.** flugo **c.** veturo **d.** aĉeto

**2.** Nun ŝi sciis, kie li ___ kaj tie ŝi montradis sin ofte en vespero kaj en nokto sur la akvo.

**a.** iras **b.** loĝas **c.** regalas **d.** kaptas

**3.** Unu fojon, kiam la profesoro ___ pri ĉevalo, eniris en la legejon iu malfruinta studento.

**a.** daŭris **b.** ripozis **c.** makulis **d.** legis

**4.** Jes, tiuj ĉi homoj ___ lin, antaŭ tiaj homoj estas inde paroli.

**a.** komprenas **b.** naĝas **c.** veturas **d.** skribas

**5.** La nokto de lia vivo finiĝis, kaj ___ hela, solena tago.

**a.** prokrastiĝas **b.** rapidiĝu **c.** komenciĝis **d.** malfruiĝas

**6.** Unu dolaro por tiu peza laboro ___ al mi ne sufiĉa, li respondis.

**a.** ŝajnas **b.** dancas **c.** signifas **d.** komprenas

**7.** Ŝi tuj ekvidis Arturon, kiu ankaŭ ŝin rimarkis kaj jam ___ al ŝi renkonte.

**a.** svarmis **b.** rapidis **c.** vidis **d.** banis

**8.** Ho, jam antaŭe mi donas mian ___ de honoro! Rapide respondis Arturo.

**a.** koleron **b.** supozon **c.** lokon **d.** vorton

**9.** La blua silka pordokurteno estis tirita antaŭ la pordo, sed el la ___ ĉambro estis aŭdata dancmuziko kaj viva interparolado.

**a.** ofta **b.** muta **c.** frua **d.** flanka

**10.** Tiu ĉi malgranda sumo, alportita de la membro unu ___ por jaro, servas jam por elspezoj de korespondado, sendado de programoj k.t.p.

**a.** nanon **b.** fojon **c.** nacion **d.** homon